



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 163

Novembro, 1999

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — kompostisto

Geoffrey Greatrex — preskontrolisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Sendu abon-monon al:

Bob Williamson

Reni Porter

329 Poplar Drive

71 RidgeValley Road

Dartmouth, Nova Scotia

Halifax, Nova Scotia

KANADO B2W 4K8

KANADO B3P 2E5

bob.williamson@ns.sympatico.ca

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



Tutisma Aliro Al Kun-Administrado

Preleganto argumentas ke okcidenta, sciencista kulturo devas akcepti indiĝenan saĝecon kaj kune administri la mondon en tutisma rilato kiu enhavas spiritecon por konservi la bonfarton de Patrin-tero kaj de homaro — la redaktoro

Respektataj Pliaĝuloj, Eminentaj Gastoj, Amikoj kaj Gefratoj:

Estas honoro al mi, ke oni petis min alparoli al vi en tiu ĉi sankta institucio de scio, de tempo favorita. Multan dankon. Mi esperas, ke miaj vortoj estos iom profitdonaj al la peno solvi la miriadon da problemoj kiuj alfrontas nin kaj tiuj kiuj alfrontos kaj niajn gefilojn kaj iliajn gefilojn.

Pliaĝulo iam diris al mi ke, se mi nervoziĝas pro preparolo al granda homamaso, mi devus deklami ŝercon. Do, laŭ lia konsilo, mi transdonos al vi rakonton kiu estas humura kaj kiu samtempe epitomigas mian percepton de komunikado inter indiĝenaj popoloj kaj tiu de la okcidenta kulturo. Por ofendi neniun, la rakonto traktas du membrojn de mia propra klano kiuj, dum bestoĉasado, trovis sin en granda embaraso, almenaŭ laŭ la vidpunkto de juna Tlingit-ĉasisto. Ili eltrovis, ke ili tute ne scias kie ili estas, kaj ili ne scias kion fari. Unu frato proponis, ke ili sekvu rivereton ĝis lagorando, esperante ke tie ili ion konitan rekonos. Tamen, alveninte ĉe la plaĝo, ili konsternite eltrovis ke ili ankoraŭ ne povis orientiĝi! La frato nun proponis, ke ili piediru laŭ la lagorando kun espero aŭ rekoni ion aŭ ke iu vidus ilin. Dum ripozo sur roko unu frato memoris hieraŭan subaŭskultitan konversacion ĉe proviantejo. Li aŭdis du blankulojn diskuti kion fari se oni malorientiĝas en la arbaro. Unu diris al la alia, ke oni devas trifoje pafi en la aeron, iom atendi, kaj poste denove trifoje

daŭrigata =>

daŭras ⇒

pafi en la aeron, kaj iam iu venos kaj savos vin. La fratoj interkonsentis, ke tiu ĉi estas bona plano kaj pro tio unu frato trifoje pafis en la aeron, kaj dum ili marŝis li jen kaj jen trifoje pafis. Ĉar neniu venis por savi ilin, ili sidis scivolante kion sekve fari.

Unu frato diris, „Sciu, mi komencas maltrankviliĝi”. Lia frato demandis. „Kial?” kaj li respondis, „Jam noktiĝas kaj al mi restas nur tri sagoj”. Tiu ĉi rakonto, spegulante efektivan vivon, priskribas la miskomunikadon kiu povas okazi inter okcidenta kulturo kaj indiĝenaj popoloj, ofte kun katastrofaj rezultoj.

Antaŭ mia lastatempa partopreno en la Komisiono de Alasko-Aborigenoj Pri Vitulin-Fokoj (Haven-Fokoj) kaj la Scienca Komisiono de Alaskaj Indiĝenoj ĉe la Universitato de Alasko, mi ne povis imagi, ke mi starus antaŭ vi, aŭ tiurilate antaŭ iu ajn, parolante por kun-administrado. Estis ĉiam kiel en la rakonto kiun mi ĵus diris al vi, estas komunikmanko aŭ miskompreno pri tio kion oni jam komunikis. Pasintecce estis nia sperto, ke kiam registara agentaro deziras interkonsenton pri kun-administrado aŭ kunlaboran interkonsenton, ĝi vere deziras ke ni kunlaboru kaj ili administru. Tradicia (indiĝena) saĝeco estis, kaj plejparte ankoraŭ estas, pripensita esti subtenata de nur anekdotoj kaj pro tio ricevis nur mallongdaŭran rekonon antaŭ forĵeton aŭ oni konsideris ĝin malaktuala kaj nevalida en la „hodiaŭa mondo”!

Unu aspekto kiu mankas aŭ estas preteratentita, kaj kiun ni konsideras la plej grava por ekvilibro, estas spiriteco. Tiu ĉi ne estas io kion oni povas kvantkalkuli, mezuri, pezi aŭ enkatalogigi.

Ŝajnas ke sciencistoj ne kredas pri io kion ili ne povas vidi aŭ iel kvantigi. Okcidenta kulturo havas diron, „Vido estas kredo.” Male, laŭ nia instruado, kredo estas vido. Se vi kredas, ke Dio kreis Patrino-Teron kaj ĉion kiu sur ŝi estas, kaj se vi respekto-plene traktas ilin, sekvas ke vido ne estas limigita al nur okulkapablo sed iĝas afero de la koro sen limo, nur kun bono. Iĝas afero de religio. Mi ne povas klarigi la signifon per vortoj, ĉar vortoj estas neadekvataj por priskribi ion sanktan. Tio postulas komprenon kiu transcendas vortojn, afero kiun ni indiĝenaj popoloj neniam dubis. Tiu kredo, kune kun la konvenaj ceremonioj por diversaj okazoj, permesis al ni konservi ekvilibron kaj vivi harmonie kun Patrino-Tero dum dekmiloj da jaroj.

Tro longtempe okcidenta scienco pretendis posedi ĉiujn sciojn, kaj ke nur ĝia teknologio povas funkcii. Ili diras ke nur ili povas savi la homaron kaj solvi ĉi tiujn problemojn, kiuj kreskas laŭ nombro kaj laŭ komplikado eĉ dum ni parolas. En mia kulturo estas antikva rakonto kiu aludas al tiaj sintenoj kaj al la katastrofaj sekvoj kiuj povas estiĝi rezulte de ĉi tia pens-maniero. La pliaĝulo kiu rakontis la historion al mi, se li ankoraŭ vivus, nun aĝus ĉirkaŭ 130 jarojn. Li rakontis ĝin tiel, kiel ĝin rakontis lia onklo, kiel estas la kutimo inter mia popolo. En la Tlingit-kulturo estis la frato de la patrino kiu instruas la nevojn. Oni kredis, ke la patro tiel amas sian filon, ke li ne disciplinus lin tiom severe kiom necesas por igi lin bona ĉasisto, bona provizanto, kaj eble gvidanto kaj respektata Pliiĝulo inter nia popolo. Ni estas patrino-linia socio kaj alprenas al ni la klanon de la patrino frato. La onklo diligente trejnadis siajn nevojn, ĉar li estis la instruisto kaj responsas pri la pekoj kiujn faras la nevoj, eĉ post ilia plenkreskiĝo. La konduto kaj moroj de sia nevo respegulis sian propran lernadon kaj honoron. Se nevo rompis leĝon, estis la onklo kiun socio konsideris responsa. Tia estis la pezo de la leĝo donita al ni de la Kreinto kaj ĝi estis respektata kaj rigide obeata. Aĝoj kontraŭ la leĝo afekciis ne nur nevon kaj onklon sed egale ĉiujn anojn de la klando. Mi rakontas ĉi tiun historion por la profito de ĉiuj sed precipe por anoj de la okcidenta kulturo kaj eĉ pli precipe por la sciencistoj.

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

(Mi ne skribos la tutan rakonton kiel mi ĝin diris pro respekto al la klano aŭ klanoj kiuj eble konsideras ĉi tiun rakonton esti inter la intelekta propraĵo de la klano. Tamen, la moroj kaj vero de ĉi tiu rakonto estas respegulita en la rakontoj de ĉiuj indiĝenaj popoloj kaj estis heredo el tempo preter memoro.)

Ni scias el ĉi tiu specifa rakonto, ke malgraŭ tio kion ni atingas en ĉi-vivo, malgraŭ la statuso al kio ni sopiras aŭ kiun ni atingas, ni ne sole tion faris. Ĉiam estas iu kiu helpis nin. Se ni prenas al ni la krediton kaj fanfaronas pri niaj atingoj, sekvas ke ni, kiel la homo en la rakonto, estos venkitaj de ni mem. Ni devas labori kune kaj pensi kiel tribo, ne individue. Ni devas labori por la profito, ne nur de ni, sed de niaj komunumoj. Ni devas ĉiam teni en la pensoj nian responson por la sekvanta generacio.

Tiel ĉi ŝajnas al mi la afero pri tiuj de la okcidenta kulturo kiujn oni nomas sciencistoj, homoj kiuj kreditas sin mem per doktoraj diplomoj. Ĉiu pretendas esti spertulo en sia fako, kiam fakte ĉiu havas scion pri nur unu tranĉo el la cirklo de vivo kaj efektive scias malmulton pri la cetero de la cirklo, pri la plej grava parto, pri la spirita faceto. Farante tion, ili perturbas la ekvilibron kaj harmonion kiuj jam ekzistis dum jarmiloj. Kiam Patrino Naturo suferas misekvilibron, homoj suferas misekvilibron, manko de harmonio ĉieas, konfuzo regas kaj ni suferas.

Se sintenoj ne ŝanĝiĝos, la suferado kreskos, kaj la malesper-krioj de niaj gefiloj kaj iliaj gefiloj estos eĉ pli grandaj ol tiuj en nia generacio kaj en la generacio kiu antaŭis nin. Kiam homoj agas libervole kaj sen konsidero de la spirita potenco kiu ĉirkaŭas nin, la rezultantaj kondiĉoj kaj/aŭ situacioj estas tiaj, ke homoj ne faras tion kio plej efike kontribuas al la propra bonfarto, al tiu de iliaj gefiloj aŭ al la bonfarto de tiu ĉi Patrin-Tero. Nur homoj havas la kapablon malekvilibrigi la Teron kaj kiam ili tion faras, ni ĉiuj suferas la konsekvencojn. Estas iom simile al la bumerango kiun uzas la aborigenoj de Aŭstralio. Kiam vi ĵetas ĝin, ĝi revenas al vi. Ni ne povas eluzi la donacojn de Patrin-Tero aŭ malŝpari ilin aŭ detrui ilin sen pagi teruran prezon. Se homoj faras tion, kiel la bumerango, ĝi revenas al ni. Ni vidas tion ĉie ĉirkaŭ ni.

Ni estis ĉiam instruitaj, ke ĉiuj aĵoj kreitaj de Dio enhavas en si fajrero de LI kaj pro tio ankaŭ spiriton. Ĉio dependas de kiel vi rigardas kaj konsideras la vivon. La Pliaĝuloj instruis nin, ke ĉiuj aĵoj posedas vivon, kaj kiam tiu kredo evidentiĝas kaj ni konscias pri tiu, ni laŭe traktas ilin. Ni devas ne mistrakti kaj misuzi ilin. Estas unu afero treti ion aŭ difekti ion se vi kredas, ke vivo mankas al ĝi. Estas tute alia afero se vi agas tiel malgraŭ scio de la malo.

Tiu ĉi Patrin-Tero suferas poluadon timige rapidan, kaj la Pliaĝuloj diras al ni, ke ŝi estas tuj disfalonta. La Tero strebas sin purigi. Ni estas jam en la fazo antaŭdirita de la Pliaĝuloj dum multaj generacioj. Inundoj, senpluveco, incendioj, tertremoj, veteraj ŝanĝiĝoj, klimataj aliiĝoj, tajdaj malsamiĝoj, fortaj ŝtormoj, kaj ĉielaj okazoj atestas tiun ĉi sinpurigon, kaj oni diras ke la situacio fariĝos multe pli malbona antaŭ ol ĝi pliboniĝos.

Sintenoj devas ŝanĝiĝi kaj la sinten-ŝanĝoj devos okazi rapide kaj tutmonde. La tiucela efektivigo ŝajnas superverŝa tasko kaj preter nia kapablo, sed ni devas strebi. Per faroj kaj preĝoj ni devas strebi. Ni ne povas daŭre preni, preni, preni sen penso pri la sekvoj – la sekvoj por ni kaj pli grave la sekvoj por tiuj ankoraŭ nenaskitaj, la infanoj de niaj gefiloj.

Okcidenta kulturo povas multon lerni de ni. Iam mi demandis al respektata pliaĝulo, kaj ekde tiam mi demandis al multaj aliaj, kial nia popolo estas superŝutita de tiom da kruda forto, de teruraj armiloj de amasdetruo, de rabado kaj ŝtelo de nia lando, de niaj virinoj kaj infanoj. Li

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

respondis, kiel preskaŭ ĉiuj repondis, “Ili ankoraŭ ne scias, sed ili venis por lerni de ni.” Dum la pasintaj jaroj mi pli kaj pli aŭdas tion, kaj ke veras, mi scias en mia koro.

Kiam mi diras, ke sintenoj devas ŝanĝiĝi, mi intencas diri ke la perceptomaniero de okcidenta homaro devas ŝanĝiĝi. Ne sufiĉas malpligrandigi ellasaĵojn de aŭtomobiloj. Ne sufiĉas instalii ellavigilojn en fabrikajn kamentubojn. Ne sufiĉas postlasi pli larĝajn netuŝitajn arbozonojn dum tutarbara prisegado. Ne sufiĉas diri, ke ni uzos nuklean energion nur en pura kaj sekura maniero. Tiu ĉi aliro estas nur kosmetika kaj faras nenion por solvi la problemon. La samaj sintenoj kiuj kreis la problemojn tute ne utilos por solvi ilin. Sen tutisma aliro tiaj ĉi solvoj estas nur sinservaj, kaj tio per si mem estas nesana, ĉar ĉiam temas pri dolaroj, kaj ju pli da dolaroj [implikitaj], des pli da memservado, kaj tio laŭvice igas la aferon eĉ pli malsana. Kiel indiĝenaj popoloj, ni scias ke tiu ĉi veras, kaj malgraŭ tio ni estis devigitaj, kiel niaj gepatroj antaŭ ni, frekventi lernejon. Oni instruas nin, ke por sukcesi ni devas gajni monon kaj ju pli da mono ni gajnas, des pli sukcesoplenaj ni estas. Gajnado de mono fariĝas la precipa kialo por vivi, aŭ eble mi devus diri: „por ekzisti”. Por sukcesi ni devas konkuri. Estis evoluo de la „NI”-generacio ĝis la „MI”-generacio. Ni scias en niaj koroj ke dikotomeco ekzistas kaj pro tio ni malesperas kaj en tiu faro ni detruas tion kio povus esti. Ĉu estas miriginde, ke inter Amerikaj Indianoj ekzistas la plej granda proporcio de alkoholismo, la plej granda proporcio de sinmortigo, la plej granda proporcio de senlaboreco? La kvanto de mortigoj [murdoj] preskaŭ ĉiutage jam kreskis ĝis nombro kiun antaŭ ne longe oni eĉ ne imagis ebla.

Pasintece oni instruis nin ke nur per donado povas ni ricevi. Nun oni instruas nin alie. Tiu ĉi sinteno de prenado detruas la ekvilibron kaj harmonion de vivo. Ĉiu kaj ĉio suferas kaj la mondo, kiun ni nun konas, ĉesos ekzisti. Tio ĉi estis antaŭ-dirita. Kiel diris hieraŭ la ĉefpreleganto de la Nord-Okcidentaj Teritorioj de Kanado, kiam ŝi parolis al la Kongreso de Soci-Sciencistoj kaj transdonis la vortojn de sia avo: la mortigo de fiŝoj kaj ĉasbestoj nome de „sporto” devas ĉesi! Kaptado kaj posta liberigado de salmoj devas ĉesi! Dio lokis ilin sur la teron por uzi respektplene, ne por ludi. Tiuj ĉi estas barbaraj kaj hontindaj agoj kiuj devas ĉesi! Kiel homo povas tiajn agojn fari kaj ankoraŭ nomi sin civilizita?

Iam mi ĉasas bestojn kun miaj filoj, kaj antaŭ ol mi mortigas ion, mi preĝas al ĝia spirito kaj al la Kreinto pro tiu ĉi donaco. Mi diras al LI, ke ni bezonas ĝin por manĝi kaj ke ni ne malŝparos ĝin kaj ke ni respektos ĝin. Mi eltrovis ke kiam oni ĉasas kun ĉi tiu sento en la koro, la besto venas kaj donacas sin al vi. Tion oni diris al mi kaj tion mi diris al miaj filoj. Kiam homo ĉasas por sporto, li agas rapide kaj sen penso kaj ĉiam prenas la plej grandan kaj la plej fortan. Kiam la mortigo tiel okazas, la besto havas neniun ideon pri kio okazis al ĝi. La Pliaguloj ĉiam diris al ni, se ni tiel ĉi mortigas bestojn, ili komencos malaperi, kaj ĉu tio ne jam okazas? Okazas! Mi scias kaj vi scias. Kaj la Pliaguloj nepre tion scias.

La kredo, ke besto donacas sin al vi eĉ pli evidentiĝis kiam mi rigardis filmon pri ĉasado de cetacoj [balenoj]. Koncize, mi ĉiam opiniis ke Inuitoj saltis leviĝen kaj suben sur felo de rosmaro por ek trovi la cetacojn. Pliagulo klarigis male al mi. „Ne,” li diris, „ni saltas sur la rosmara felo por ke ili povus vidi nin.” Tion ĉi ni kredis dum dekmiloj da jaroj, kaj la kredo bone servis nin. Nur nun ni luktas por trovi manĝaĵon. Ni devas strebi retrovi tiun kiu malaperis antaŭ ol tiu estas por ĉiam perdita.

Prelego de Raymond D. Sensmeier, kiu estas ano de la Tlingit gento de alaskaj indianoj. Lia adreso: P.O. Box 8, Yakutat, Alaska 99689, U.S.A.

— tradukis Steĉjo Norvell

